

El la enhavo:

V.Havel - protektanto de UK
ILEI-konferenco en Tábor
Blindula Kongreso en Beroun
Josef Vondroušek
Mi legis „Hetajro dancas“
Homonimoj 8
aboneblaj gazetoj
Libroservo



ORGANO DE CEHA ESPERANTO-ASOCIO



Josef Vondroušek

1.12.1904 - 6.12.1995

P.F. 1996

Pojďte se mnou do Betléma... !
Sejde se tam pestrá cháska.
Dnes noc nezůstane němá.
Snad se znovuzrodí - láska.

Vše je jiné nežli kdysi...
Jen ty svíčky stejně planou.
Chtěl bych ty vánoce vzkřísit...
ale smím jim říci nashledanou...?

František Kožík

P.F. 1996

Iru kun mi Betlehemon... !
Venos tien bunta klano.
Nokto perdos silentemon.
Eble renaskiĝos - amo.

Tempo ŝanĝis mondan vaston...
Nur kandeloj same flagras.
Mi rekreus ĉi Kristnaskon...
sed ĉu ĝisi mi nun rajtas...?

František Kožík

(esperantigis M.Malovec)

P.F. 1996

Pišu pořád knížku jedinou
Řeč hledám již zni prahmota
Rej slov se k hlubokému nebi
v světelném proudu třepotá

S hrdinnou vírou letí ptáci
Marně se šklebí temnota
Ať povzbudí svět vlídný jas
paprsek co se vždycky vrací

Ať dlouho svítí krajinou
plamínek žití uvnitř nás
Dny prozářit je zapotřebí
v knize života

Čestmír Vidman

P.F. 1996

Nur unu libron mi senĉese verkas
vortojn elektas el pramaterio
parolon helan en la fluo serĉas
kiu sin svingas alten al ĉielo

Flugas la birdoj brave kun pasio
vane rikanas tenebro
Veku la mondon milda sereno
ĉiam revenu la suna radio

Senĉese brilu tra nia lando
la krea fajro en nia koro
Tagojn lumigi urĝe necesas
en la vivlibro dum ĉiu horo

Čestmír Vidman

Ni eniris penigan jaron

Vlastimil Kočvara

Dum mia - jam sufiĉe longa - esperantista vivo mi multfoje aŭdis, legis kaj pensis pri la 13-a UK okazinta en Prago en 1921. Mi mem renkontis kelkajn samideanojn, kiuj ĝin ĉeestis. Ili ĉiuj havis belegajn rememorojn kaj parolis pri ĝi kiel pri brila, perfekta, impona kaj kortuŝa travivaĵo en ilia vivo. Kiam mi movade iom maturiĝis, mi partoprenis kelkajn Universalajn Kongresojn kaj mi ofte kaptis similajn impresojn. Post spertoj de partoprenanto mi ekrevis travivi kongreson ne kiel spektanto, sed kiel ĝia aganto laboranta malantaŭ la kongresa scenejo, kion mi konsideras la plia ŝtupo de laboro por esperanto: ne ĝin ĉiutage uzi, sed ebligi ĝian uzon al multaj aliaj gesamideanoj.

En tiu ĉi jaro tiu okazo jen aperas. Post kelkaj ne sukcesintaj antaŭaj ofertoj havas la ĉeĥaj esperantistoj eblecon per okazigo de la 81-a UK, sur kiun partoprenis la altan protekton la prezidento de nia respubliko, pruvi, ke ili kapablas la internacian lingvon ne nur uzi kaj popularigi, sed ili kapablas krei medion, en kiu ĉiu interesulo povas la internacian lingvon paroli, aŭdi, kanti, ridi, fake diskuti aŭ leĝere babilu - unuvorte, ĉiuforme praktiki. Tiun eksterordinaran spacon kreas Universala Kongreso kun siaj programoj, kunvenoj, ekskursoj, paroladoj kaj pluraj aliaj kongreseroj. Ju pli bonajn kondiĉojn por paso de UK oni preparos, des pli bonajn impresojn forportos kun si el Prago kongresaj partoprenintoj.

Por tiu ĉi jaro ni prenis vere malfacilan taskon. Estu ĝi inspiro por ĉiu nia membro, por ĉiu esperantisto en Ĉeĥa

Respubliko pli intensigi sian propran agadon en Esperantio. La kongreso instigu hezitemulojn nove prilabori la kampojn de la internacia lingvo, laboremuojn viciĝi inter organizantojn kaj helpantojn de la kongresa komitato, timemulojn ekparoli en Esperanto. Por ĉiu troveblas laboro, tasko, ebleco.

Ni ĉiuj komune sukcesigu la mondan renkontiĝon de esperantistaro en Prago. Ek al la kongresa jaro 1996!

Prezidento V. Havel - Alta Protektanto de la 81-a UK

Vlastimil Kočvara

La 25-an de novembro okazis en Praha kunveno de LKK de la 81-a UK. Partoprenis ĝin ankaŭ Konstanta Kongresa Sekretario Nikola Rašič, kiu alflugis Pragon jam vendrede. Kune kun prezidento de LKK, s-ano Vl. Kočvara, kaj ing. Jos. Kříž, kiu ekoficialiĝis en LKK kiel „ekskurso-estro“ oni dediĉis la tutan vendredon al traktadoj ĉe Ĉedok kaj en Palaco de Kulturo (nun havanta la novan nomon Kongresa Centro) pri diversaj kongresaj demandoj - speciale hoteloj, ekskursoj kaj uzebleco de salonoj en la Kongresa Centro. Sabatan kunsidon krom jam funkciantaj LKK-anoj partoprenis unuafoje ing. Jos. Kříž kaj Mgr. Marie Drašnarová, kiu prizorgos la „bonvenigan servon“ de la UKo. Nove membriĝis en la komitato s-ino PhDr. Marie Kaufmannová (Vanĉurová), kiu zorgos pri arta kongresa programo. De mateno ĝis malfrua posttagmezo estis traktitaj diversaj facetoj de la prikongresaj laboroj. S-ino Podhradská informis pri stato de jam aliĝintaj „helpantoj“ por la kongreso, de kiuj ankoraŭ ne estas sufiĉa nombro. Ĉar antaŭ fino de

la unua aliĝperiodo aliĝis al la 81-a jam 300 personoj el Ĉeĥa kaj Slovaka Respublikoj, mi esperas, ke pluajn helpantojn ni trovos inter ili. Mi supozas, ke por senproblema fluo de la kongreso necesas almenaŭ 50 helpantoj. Ĉiuj estos en preparperiodo sufiĉe informotaj pri ties taskoj kaj laboroj dum la kongresa semajno en du seminarioj. La unua okazos jam fine de februaro en Nymburk kaj la informanto estos Nikola Rašič.

La dudekan de decembro mi ricevis gravan sciigon, ke la prezidento de nia respubliko Václav Havel transprenis Altan Protektantecon de la 81-a UK. Tiu ĉi fakto certe grave influos pluajn preparojn de la kongreso. En nuna tempo la CO de UEA en Roterdamo redaktas la Duan bultenon, al kiu ni disponigis bezonatan materialon. Ĝin ricevos baldaŭ ĉiu aliĝinto al la kongreso. Krome oni nun traktas kun diversaj eminentuloj el Ĉeĥa Respubliko eniri la Honoran Komitaton de la kongreso. Pri la rezultoj ni baldaŭ informos la legantaron.

La preparoj de la kongreso daŭras flue, kvankam kelkaj laboroj iomete malfruigas.



62-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

disvolviĝos de la 20-a ĝis la 26-a de julio 1996 en Beroun. Informoj: Jiří Vychodil, Žandovská 304, 190 00 Praha

Nevidantoj uzas Esperanton

En la verko de PhDr. Josef Smýkal „Tyflopédické kalendárium“ estas 15-oble mencita evento rilata al Esperanto, en la indekso de personoj estas V.Echtner, K.E.Macan, S.Stejskal, H. Thilander, L.Zamenhof kaj inter literaturistoj fontoj por la verko de S.Kamarýt „Historio de Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio“.

Josef Smýkal: Tyflopédické kalendárium. Bmo, Ĉes. unie nevidomých a slabozrakých a odkaz kultury Magistrátu města Bma, 1995; 146p. A5.

„Blindulmuzeo“ en Brno (adreso: Slepěcké muzeum v Brně, Chaloupkova 7, 612 00 Brno) sur la leterpapero havas sian priskriban nomon en kvin lingvoj, la kvina estas Esperanto: MUZEO PRI LA VIVO KAJ KULTURO DE NEVIDANTOJ.

we

30-a INTERNACIA KONFERENCŬ DE ILEI

Tábor, Ĉeĥio

27.7.(sabato) ĝis 2.8. (vendredo) 1996

Lige kun Universala Kongreso okazos ĉi-jare en Ĉeĥio pluraj aranĝoj. Sendube unu el plej gravaj estos renkontiĝo de esperantaj instruistoj, kiun antaŭvideble partoprenos pli ol 100 homoj el diversaj landoj.

Post traktado kun ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) ni povas speciale por ĉeĥoj antaŭmeti tre favorajn kondiĉojn, kiuj donas unikan ŝancon al veraj interesitoj partopreni.

Bedaŭrinde lastjare kelkaj alilandanoj venis al la konferenco sole por turismi kaj plilongigi al si restadon en Finnlando kaj misuzis tiel la sencon de la

renkontiĝo. Tial organizantoj petas vin almenaŭ koncize prezenti vian aktivecon en E-medio, speciale en la koncerna fako. Tamen ne timu, ke sen sufiĉa praktikado oni ne permesos al vi partopreni. Ĉiu vera interesito estas bonvena!

La tuta aranĝo okazos en la urbo Tábor. Kiel konferenceto servos moderna novkonstruita Sudbohemia universitato situanta en la urbocentro.

Ekzistas du kategorioj por loĝi. Speciala rabato por ĉejoj koncernas bazan kategorion, kie loĝos kaj manĝos pli multaj partoprenantoj. Ĝi estas mezlerneja internulejo (100 metrojn de la universitato) kun trilitaj ĉambroj, simpla meblaro kaj necesejoj/duŝejoj enkoridore. La loĝado estas neniel luksa, sed plenumas ĉiujn bazajn kondiĉojn. Ĝi liveras ankaŭ malgrandajn kuirejojn kaj komunajn ĉambrojn por kelkdek personoj.

Speciala multtrabatita kotizo por ĉejoj estis starigita al 1.600,- Kč kaj validas al aliĝoj ĝis 31.3.1996.

Prezo inkluzivas:

- 6 tranoktojn en 3-lita ĉambro
- 3 manĝojn tage (ekde vespermanĝo 27.7. ĝis matenmanĝo 2.8.)
- kompletan konferencan programon en la universitato
- duontagan ekskurson tra la urbo kun enirpagoj
- duontagan busekskurson al la ĉirkaŭaĵo kun enirpagoj (supozeble al la kastelo Hluboká)
- muzikan (danc)vesperon (refreŝigo krompagebla)

Ĉiu mem prizorgas sian asekuron.

Kontraŭ krompago eblas aranĝi bustransporton Praha-Tábor 27.7.

Aliĝoj post 31.3.96 estas ŝargataj per pluaj 10%. Aliĝoj post 30.6.96 estas sen ajna garantio kaj ŝargataj per 30%.

La aliĝo fariĝas valida nur post kom-

pleta pago. Ne forgesu tial peti aliĝilon tiel frue, ke vi sukcesu pagi antaŭ 31.3.96!

Vian koncizan sinprezenton kaj peton pri aliĝilo atendas ĉeĥaj kunorganizantoj: **Vladimir & Pavla DVOŘAKOVI, Ostravská 637, 199 00 Praha 9, tel. 02-899602**

Organizantoj kontinue informos pri la konferenco en venontaj numeroj de Starto.

OSTRAVA-PORUBA

E-klubo ne estas multnombra, sed agema. Dum la jaro 1995 realiĝis kurso por komencantoj kaj progresintoj. Por klubanoj estis eldonitaj du broŝuretoj: „Jogo por la sano“ kaj „Fable kaj fablele“, kantareto de nove tradukitaj kantoj, bpk okaze de Pasko kaj Novjaro. El Esperanto estis tradukitaj kelkaj libroj en nacian lingvon, kiuj aperos en eldonejo Komers-Esotera. La geklubanoj dum la jaro vizitis tridekon da E-aranĝoj en Ĉeĥio kaj en najbaraj landoj, en kelkaj ili aktivis per prelegado, projekciado, kantado kaj gitarludo, per siaj artikoloj kontribuis al enlandaj kaj eksterlandaj gazetoj. Ĉiu kursano havas jam sian korespondanton. En la klubo prelegis ankaŭ eksterlandanoj. La plej juna klubano estas 12-jara, la plej matura 75-jara. La klubanoj abonas naŭ E-gazetojn.

Vlad. Sládeček

E-Silvestro en Česká Třebová

La 29-an de decembro 1995 kunvenis en Kultura klubo en Česká Třebová ĉirkaŭ 80 gesamideanoj el diversaj lokoj de Ĉeĥio por soleni la finon de 1995. Noktomeze ĉiuj adiaŭis la malnovan E-

jaron 1995 kaj bonvenigis per kanto pri verda stelo la kongresan jaron 1996. Sub Kristmaska arbo ĉiu trovis donacetojn, plejparte ŝercajn, kiuj ridigis siajn dispakantojn (mi mem ricevis kreton por blankigi miajn dentojn).

La gazeto *Orlické noviny* aperigis la 5-an de januaro 1996 mian artikolon „Esperantistoj el Amikeco bonvenigis la novan jaron. La ĉeatrebovanoj festas Silvestron ĉiun fojon kun amikoj el aliaj urboj kaj landoj.“ Jen la E-traduko:

Jam pli ol dudek jarojn la E-rondeto „Amikeco“ en Ĉeĥa Trebovo festas jarfinon la 28an aŭ 29an de decembro.

Origine festis la Esperanto-Silvestron nur grupeto da klubanoj, sed la nombro de partoprenantoj ĉiujare kreskis. Alvenadis geamikoj, kaj nun la E-Silvestro en Ĉeĥa Trebovo, same kiel la E-balo, estas konata ankaŭ inter la esperantistoj en eksterlando. Kiu foje venis - alvenas denove.

Ĉijare kunvenis ĉirkaŭ 80 homoj, por danci ĉe muziko de Zoubek-ensemblo kaj por povi babili almenaŭ unufoje en jaro. La plej multnombraj grupoj venis el Prago kaj Pardubice, sed estis tie ankaŭ gastoj el Germanio kaj Nederlando. La alvenintojn bonvenigis tosto. Pri mango kaj trinko por ili zorgis Sváťa Ĉech kun la filo. Vespere ĉiujn per vortoj akompanis Jiří Pištorá kaj per poemo plezurigis Jiří Vencl.

Ĉiu el la partoprenantoj havis hejmkarton - papereton kun sia nomo kaj domicilio - iun ajn kaj ie ajn survestigitan. La ĵurio havis malfacilan taskon - trovi la plej belan kaj plej spritan. Elektita estis junulinjo, kiu havis indikojn pri si sur la dorso en formo de granda nokta papilio. Alia el la elektitaj knabinoj havis la nomon kaj domicilon sur la orelingo. El Pardubice oni

alveturis kun la nomoj sur skarpoj. Unu el la Trebovanoj surhavis hejmkarton en formo de suno ridetanta de orelo al orelo kiel li mem. Kvankam estis elektitaj kvin hejmkartoj anstataŭ origine tri, multaj aliaj hejmkartoj al mi plaĉis ankaŭ. Ekzemple hejmkartoj el Pardubice en formo de spickukaj koroj aŭ hejmkarto de esperantisto el Prostějov, kiu antaŭvide memoris pri noktaj postsekvoj de la silvestra festeno. Ĝi postulis transdoni la hejmkarton ĉe la koncerna adreso kaj lasi la posedanton sur la loko, kiu li estos falinta. Nia klubestrino opiniis sin tiel „fama firmo“, ke ŝi ne bezonas indiki sian nomon.

La ĝeneralan intereson ĝuis konkurso pri kreado de laŭmoda vesto el higiena papero. Unu „modelinon“ prezentis eĉ knabo kaj postulis specialan premion kiel sola viro inter kvar junulinoj. La modeloj estis efektive diversspecaj - unu robo eĉ kun trenaĵo, alia kun papera floro en la haroj. Sed ne pensu, ke ĉi tie estis nur konkursoj. La muziko ludis tre ĉarme kaj la dancantaj paroj havis la tutan salomon je sia dispono.

Prokismiĝis la noktomezo. La malnova Esperanta jaro 1995 finis sian regadon kaj diris adiaŭ. En la malheliĝinta salono dormetis esperantistinoj en noktoĉemizoj kaj la nova jaro - ankoraŭ tute juna kun cicumo - komencis la dormantinojn veki. Li memorigis, ke ĉijare atendas ilin la Esperanta kongreso en Prago. Tial gimnastiki kaj ek al la laboro! Post la gimnastiko ĉiuj ĉeestantoj kantis ĉe la tosto Esperantan kanton pri tostado kaj verda stelo. Sed per tosto oni ne finis. Sub la arbo la partoprenantojn atendis amasego da donacoj, pri kiuj Jiří Pištorá deklaris, ke ili estas tre valoraj. Kelkaj efektive, aliaj pro spriteco.

Esperantistoj disiris en agrabla humoro. Kelkaj el ili revidos sin en Prago dum la kongreso okazanta inter 20a kaj 27a de julio. Se vi havas intereson, rapidu sendi aliĝilon.

Zdenka Novotná

Esperanto-balo en Česká Třebová

Ĉijare realiĝis jam la 27-a Esperanto-balo por nefumantoj, la 20-an de januaro 1996, kun bela muziko de DUAL kaj interesa tombolo. Alveturis gesamideanoj el diversaj urboj, simile kiel dum la antaŭaj 26 jaroj.

Zdenka Novotná

Kupona privatigo - ĉu ni sukcesis?

Vlastimil Kočvara

Kiam aŭtune 1992 naskiĝis en la komitato de ĈEA ideo akiri akciojn por estonteca subteno de la asocia buĝeto, oni havis tiam apenaŭ ĝustan imagon pri rezulto. En entuziasmo de la unua privatiga ondo oni nur esperis pri bona sukceso. Sed lastatempe en la ĉeĥa gazetaro ofte publikiĝas informoj pri diversaj trompoj, malfidoj kaj priŝteloj lige kun komerco kun valoraj paperoj. Sekve iuj niaj membroj povus demandi sin: ĉu nia tiama ideo estis ĝusta?

Nu, ni koncize rerigardu la fluon de la afero: En la kapo de kelkaj komitatanoj ekĝermis tiu ideo, kiam oni ricevis informojn, ke ne ĉiuj membroj interesiĝas pri komenciĝinta privatigo pro diversaj kaŭzoj. La tempo jam prokrastis, antaŭ la privatigaj oficejoj staris

longaj homvicoj kaj necesis do tuj ekagi. La fakto, ke la financa situacio de la asocio estis tiutempe kontentiga kaj espero, ke estontece povus akcioj grave kontribui al ĝia ekonomia stabilo instigis la komitaton oferti al membroj kovron de elspezo por aĉeto de bezonata „kupona libreto“ kondiĉe, ke oni - post ekposedo de akcioj - dediĉos al la asocio duonon de ili, dum la duan duonon oni rajtas lasi por si. Ĉar ĉi-kaze fakte temis pri estonta donaco al la asocio, la komitato promesis al ĉiu donaconto dumvivan membrecon en ĈEA kaj krome liberan elekton el la varostoko de la asocio en valoro de 400 kronoj.

Al la unua alvoko en januaro 1992 aliĝis 44 esperantistoj. Sekvis necesaj laboroj por konkretigi la kontraktojn kaj laŭleĝe validigi ilin. Preskaŭ tutan jaron daŭris ol estis ĉio plenumita kaj konfirmita, ĉar necesis i.a. konsulti juristojn kaj aliajn fakulojn pro nesufiĉaj spertoj de niaj komitatanoj tiudirekte. Dum tiuj ĉi monatoj kelkaj el aliĝintoj ŝanĝis sian intencon pri akcioj, do fine la jure poluritajn dokumentojn pri transdono de akcioj al ĈEA subskribis 36 membroj - pro tiu ĉi subskribo ekde tiam dumvivaj.

La duan etapon de la „operacio“ transprenis la subskribinto. La unua paŝo estis registri la asocion ĉe la Centro de Kupona Privatigo, ĉar nur tiam la organizaĵo povas posedi akciojn kaj manipuli kun ili. ĈEA estis registrata en februaro 1993 kaj post tio ekde aprilo efektiviĝis transprenado de akcioj, kio finiĝis ĝuste antaŭ kelkaj semajnoj.

Jes, tiom longe daŭris tiu ĉi afero, kiun postulis vastan korespondadon, prizorgadon de plenrajtigiloj kaj simile. Oni komprenu, ke la donacintoj estas plejparte olduloj, kiuj malbone orientiĝas en la nuna leĝo-ĝangalo, speciale se temas

pri manipulado kun valorpajeroj. Estas triste, ke dum tiu tempo eĉ du donacintoj mortis, unu el ili antaŭ ol fermi la transdonon de akcioj.

Tamen, la ideo plenumiĝis. En kelkaj kazoj estis la donacintoj pli grandanimaj ol oni esperis. 4 membroj donacis al CEA ĉiujn siajn akciojn, do ne nur kontraktitan duonon. Estit tio gesamideanoj M. Beranová kaj M. Krupička el Volary, M. Hlaváč el Plzeň kaj J. Šperling el Praha. Kelkaj aliaj rifuzis rajton elekti varojn el la asocia libroservo aŭ pagis mem sumojn ligitajn al transdono de akcioj (J. Hofman el Plzeň, J. Plamínková el Nenkovice). S-ino M. Bartovská el Frýdek-Místek dediĉis parton de siaj valorpajeroj eĉ sen subskribi la kontrakton.

Resume, Ĉeĥa Esperanto-Asocio havas preskaŭ kvarcent diversajn kaj ankaŭ diversvalorajn akciojn de 36 donacintoj. La asocio elspezis por tiu ĉi celo sume ĉirkaŭ kvindek mil kronojn. Dividendojn ĝi ricevis unuafoje en tiu ĉi jaro, ĝis nun entute preskaŭ 7 mil kronojn. Montriĝas, ke daŭros ankoraŭ kelkajn jarojn ol la elspezita sumo estos rericivita, sed poste la asocio tamen iom profitos. Ni esperu, ke dividendoj kreskos kaj tial ili bone apogos la jarajn buĝetojn de la asocio.

El tiu vidpunkto la ideo kaj ĝia plenumo estos ĝusta. Al gvidantaro de CEA tio ankaŭ pruvis, ke nia movado havas multajn oferemajn adeptojn, kiuj por Esperanto kapablas oferi multon. Tio estas certa garantio, ke la asocio travivos eĉ la nunan iom krizan tempon kun iom pli oftaj priduboj de nia sencoplana laboro por kaj per internacia lingvo.

La ekzemplo de supre nomitaj membroj kaj pluaj donacintoj invitas al imito. Oni povas ĉu transdoni ĉu herediĝi al la

asocio rimedojn, kiuj diversmaniere apogus ĝin. Jen tio estas la plej alta rekono al la movado, kiu celas tiel noblan celon, kiel estas la tutmonda interkompreniĝo kaj fratiĝo.

Informoj el la komitato de ĈEA

En lastaj monatoj de la pasinta jaro okazis du ordinaraj komitatkunvenoj de ĈEA. Oktobre ĝi kunsidis lige kun la asocia konferenco en Brno. Ja ankaŭ la ĉeftemo estis la konferenco, ĉar estis necese lastmomente kaj surloke precizigi kelkajn programerojn de la konferenco. Pri la rezultoj de konferenco ni informis jam en la pasinta numero de Starto. Sed mi devas tuŝi la komitatkunsidon, ĉar ĝi decidis altigi la membrotizojn por la jaro 1996. Pri tiu temo mi ricevis kelkajn plendajn leterojn. Mi komprenas la skribintojn, ankaŭ al mi ne plaĉas altigo de la kotizoj. Sed oni devas alkitimiĝi, ke tio ĉi estos daŭra fenomeno. En nia respubliko samkiel en la tuta mondo estas konstanta inflacio, kiu ĉe ni moviĝas ĉirkaŭ dek procentoj. Tio signifas, ke la elspezoj de la asocio fakte en ĉiu jaro kreskas pri la sama sumo, verdire eĉ pli, ĉar en iuj por ni gravaj sferoj la prezoj kreskas pli vigle, ekzemple en tipografio. Jes, oni povus iel maniere ŝpari rimedojn, ekzemple ŝanĝi aperoftecon de Starto, uzi malpli plaĉan jam nun ne tre luksan presmanieron aŭ ne pagi al la komitatoj vojaĝkostojn por komitataj kunvenoj. Aŭ ne pagi al la asocia librotenisto por lia grava laboro - cetere la salajro estas ege modesta. Tamen, ekzistas minimuma limo, kiun

ni ne volus subiri - ĉu por konservi agadkapablon de la asocio, ĉu por garantiĝi ĝian kontentigan funkciadon. Nu kaj en Brno post diskutinte la ekonomian staton de ĈEA ni devis alpaŝi al tiu ĉi kotizaltigo, kion ebligas la statuto de ĈEA (art. V, punkto 2i). Finfine, ni baldaŭ prezentos al la membraro jarfinan kalkulon kaj ĉiu membro povos vidi, kiel ni mastrumas. Ni kredu, ke atendata esperiga gajno el okazigo de la 81-a UK en Praha helpos al la asocio por certa tempo eviti ripetadon de la ĉijara altigo.

La lasta komitatkunsido okazis en Brno komence de decembro. Oni resumis la ekonomian flankon de la konferenco kaj samtempa festivalo „Filmo kaj video en Esperanto“, kiu grave helpis al financa ekvilibro de la konferenco. Ĉefa punkto de la kunveno ja estis informoj pri stato de preparlaboroj de la 81-a UK kaj de la akompanaj entreprenoj - la antaŭkongreso (organizas ĈEA kaj Kava-Pech), la postkongreso kaj aliaj. Plue estis denove traktita Starto - ĝin nun eblas aperigi regule en Opava, do estis akceptitaj limdatoj por redaktotino (la 15-a de ĉiu malpara monato) kaj por la eldono (la 15-a de para monato). Do, kontribuontoj - **kiuj terure malabundas** - respektu kaj ankaŭ uzu ĉi regulecon! Estis akceptita refondigo de la E-klubo en Liberec, kie la movado iel stagnis. Ankaŭ estis decidite subteni la iniciaton de Iltis-eldonejo kaj R. Hauptenthal fondi „Fondaĵon Karolo Piĉ“ kaj mi alvokas membrojn subteni tiun ĉi agon (pri ĝi legu en la pasinta numero).

La venonta komitatkunsido okazis januare en Nymburk.

Vlastimil Kočvara

Forpasis Josef Vondroušek

La 6-an de decembro 1995, kvin tagojn post sia 91-jariĝo, neatendite mortis honora membro de ĈEA kaj UEA, diligenta tradukanto el la ĉeĥa literaturo, sinjoro Josef Vondroušek. Neatendite, ĉar malgraŭ sia alta aĝo li aspektis apenaŭ 70-jara, vigla, aktiva kaj tute ne kaduka. Ni supozis, ke li sen problemoj ĝuos UK en Prago, por kiu li preparis sin kun plezuro.

Josef Vondroušek naskiĝis la 1-an de decembro 1904 en Brno, kie li ankaŭ studis liceon kaj komercan akademion kaj ekoficis kiel bankoficisto. Esperantistiĝinte en 1922, li membriĝis en Esperanto-Klubo en Brno kaj baldaŭ tie plenumis funkciojn de sekretario (1929) kaj prezidanto. De post 1931 li estis komitatano de la Asocio, fidele kunlaboranta. Li sciis krei novan publikon esperantistan kaj areton de kunlaborantoj, kiuj grandparte devenis el la kursoj de li daŭre organizataj kaj tre ofte persone gvidataj. Josef Vondroušek komprenis egale la gravecon de loka agado kaj de la kunlaboro kun la centro kaj la signifon de la regulaj kunvenoj kun allogaj programoj, sciis ĝentile kaj persiste insisti pri esperantlingva konversacio kaj pri partopreno de multaj membroj en la kluba aktiveco. En 1945 fariĝis la programoj de la klub-kunvenoj en Brno afero antaŭe planata por ĉiu monatkvaroj, kio estis aranĝo modela, praktikata en nemultaj kluboj aliaj sur nivelo tiom alta. Dum kvin jardekoj Josef Vondroušek preparis Bultenon de EK Brno kun la programoj kaj multaj aktualaj informoj.

Josef Vondroušek fariĝis nekutime fekunda konanto de la Esperanto-literaturo, precipe beletra. Krom tio li

fariĝis majstro en esperantlingva konverŝacio, kiun li estris en unika kvalito. Krome li publikigadis multajn propagandajn kaj informajn artikolojn kaj noticojn ĉeĥajn. Menciindas almenaŭ liaj rubrikoj gviditaj dum kvar jaroj en la gazeto *Ruch* kaj *Nový lid*. Regule li sendadis informojn pri la movado al ĉeĥlingvaj ĵurnaloj en Brno.

Lia edzino Milada Vondroušková (1913-1971) estis lia konscienca helpantino precipe en la organiza agadsfero, ekz. dum ambaŭ ĉeĥoslovakaj Esperanto-kongresoj okazintaj en Brno.

Dum multaj jaroj li gvidis Esperanto-kursojn en Klubo de Brno kaj en Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, precipe pri historio kaj literaturo de Esperanto (pri kiuj li verkis lemolibrojn) kaj la saman fakon li ekzamenis ĉe la asociaj ekzamenoj de ĈEA.

Lia plej granda merito kaj verko estas tradukado el la ĉeĥa literaturo, precipe la verkaro de Karel Čapek, lia amata aŭtoro. Lia literatura agado precipe akiris por li ne nur titolon de honora membro de ĈEA (1979), sed ankaŭ de UEA (1992). Traduki li komencis post la dua mondmilito. Li ellernis parkere Plenan Vortaron por esti armita per granda vortostoko. Siajn tradukojn li plurfoje relaboris, lasis ilin „ripoz“ kaj post certa tempo reverkis ilin denove. Li klopodis, ke lia Esperanto estu klara kaj eleganta.

Ĝis nun aperis jenaj verkoj de Josef Vondroušek: *Historio kaj biografioj* (1977), *Historie a spisovatelé* (1984), ambaŭ por SET Lančov, *Libro de apokrifoj* (1970) kaj *Rakontoj el unua poŝo kaj Rakontoj el la dua poŝo* (1981) de Karel Čapek, *Ondro kaj drako* (1985) de Viktor Dyk, *El mia vivo* (1985) de Vítězslav Nezval, *Milito kontraŭ*

Salamandroj (1994) de Karel Čapek, *Propra biografio de Karolo la IV-a* (1995) kaj du antologioj: *Ĝojoj de mia vivo* (1984) okaze de lia 80-jariĝo kun tradukoj el Jirásek, K. Čapek kaj J. Šmíd kaj *Karel Čapek* kun fragmentoj el la verkaro de la ĉeĥa majstro en traduko de J. Vondroušek (aranĝis J. Karen).

El liaj manuskriptoj estas komputile prilaboritaj kaj preparitaj por eldono *Saturnin* de Zdeněk Jirotko, *Naŭ fabeloj de fratoj Čapek*, *El la notlibro de sankta Petro* de Jarmila Hašková, *Princido Bajaja* kaj *Punita orgojlo* de Božena Němcová, teatraĵo *Aŭdienco* de Václav Havel, kiu estis prezentita en 1993 la dum komuna Ĉeĥa-germana kongreso en Karlovy Vary, kaj *La plej eminenta el Pierotoj* de František Kožík, tradukita komune kun Jiří Karen.

En manuskriptoj ankoraŭ atendas prilaboron jenaj verkoj: *Super valoj mateniĝas* de František Kožík, *Malnovaj ĉeĥaj mitoj* de Alois Jirásek, *Puraj ĝojoj de mia vivo* kaj *Reveno de puraj ĝojoj* de Jan Šmíd, *Edzinigebla knabino* kaj *Zorgoj de kronitaj kapoj* de Milošlav Švandrlík, *Primoloj* de Svatopluk Čech, *Ŝtono kaj doloro* de Karel Schulz (unuaj 250 paĝoj) kaj verkoj de K. Čapek: *Afero Makropulos*, *El vivo de insektoj*, *Hordubal*, *Meteoro*, *Ordinara vivo*, *Italaj leteroj*, *Anglaj leteroj*, *Ekskurso en Hispanion* kaj ankoraŭ aliaj eble estos trovitaj.

Kiel vi povas vidi, sinjoro Vondroušek inklinis traduki bonhumorajn verkojn, ĉar „en la mondo estas sufiĉe da malĝojoj kaj en Esperantujo bonhumoraj verkoj ne abundas“. Ni ĝuu fragmenton el Naŭ fabeloj:

KAZO KUN NIKSO EL HAVLOVICE

„Ankaŭ mi havis interesan kuracistan kazon,“ aŭdigis la doktoro el Úpice. Ĉe ni en Úpa post ponteto de Havlovice en salikradikaro kaj alnoj vivis maljuna nikso, nomata Joudal; li estis mormulo, malafablulo, ĉagrenulo kaj grumblulo, iam li kaŭzis inundojn kaj de temp' al tempo dronigis infanojn, kiam ili baniĝis; mallonge, homoj ne ŝatis lin vidi en tiu rivero.

Foje aŭtune venis al mi en konsultejon maljunulo, havas verdan fraketon kaj sur la kolo ruĝan tukon, kaj ĝemaĉas, tusas, temas, snufas, ĝemas, remungas kaj nazparolas: 'Sinjor' doĥtoro, mi kaptis ian malvarmumon aŭ kataron; ĉi tie min premas kaj tie pikas, lumboj doloras, en la artikoj lancinas, mi tusas, mire, ke mi ne ŝiriĝas kaj nazkataron mi havas kiel trabon; mi petus do pri ia medicinaĵo.'

Mi diagnozas lin kaj diras: 'Maljunulo, tio estas reŭmatismo; mi donos al vi ŝmiraĵon, ĝi estas linimento, por ke vi sciu, sed ankoraŭ ne ĉio. Vi devas multe restadi en varmo kaj seko, ĉu vi komprenas?'

'Mi komprenas, ' murmuris la oldulo. 'Sed kun la seko kaj varmo ĝi versimile ne eblas.'

'Kial ĝi ne eblas,' mi demandas lin.

'Nu,' diras la oldulo, 'ĉar mi estas nikso el Havlovice, sinjor' doĥtoro. Kiel mi povas fari al mi en akvo sekon kaj varmon? Ja, eĉ la nazon mi devas viŝi al mi per akvosurfaco, en la akvo mi dormas kaj per la akvo mi kovras min; kaj nur nun en mia aĝo mi donis en mian liton molan akvon anstataŭ la

malmola, por ke mi pli mole kuŝu. Sed kun tiu seko kaj varmo ĝi estos malfacila afero, jes.'

'Kion fari, avo,' mi diras; sed en la malvarma akvo la reŭmatismo eĉ malboniĝos. Sciu, maljunaj ostoj volas varmon. Kiun aĝon fakte vi havas, sinjoro nikso?'

'Eh,' murmuris la nikso, 'sinjor' doĥtoro, mi estas ĉi tie ankoraŭ el la paganaj tempoj - do eble mil jarojn kaj eble ankoraŭ multe pli. Jes, kiom da jaroj!'

'Vi vidas do,' mi diris al li, 'en tia aĝo, avo, vi devas restadi apud forno. Atendu, mi havas ideon! Ĉu vi aŭdis iam pri varmaj fontoj?'

'Mi aŭdis, jes, mi aŭdis,' gruntis la maljuna nikso. 'Sed ĉi tie neniam estas.'

'Ĉi tie ne,' mi diras, 'sed ili estas en Teplice kaj Píšťany kaj ankoraŭ aliloke, kaj ili estas profunde en la tero. Kaj la varmaj fontoj, sciu, estas kreitaj ĝuste por la maljunaj kaj reŭmatismaj niksoj. Simple en tia varma fonto vi loksidiĝos kiel nikso varmakva kaj dume vi kuracos vian reŭmatismon.'

'Hm, hm,' hezitis la oldulo, 'kaj kian laboron fakte havas tia varmakva nikso?'

'Ne multe,' mi rediras, 'nur li devas konstante tiri la varman akvon el profundo de la tero, por ke ĝi ne malvarmiĝu. Kaj superabundon de la varma akvo li igas fonto al supraĵo de la tero. Jen ĉio.'

'Nu, ĝi eblas,' murmuris la nikso el Havlovice. 'Mi serĉos do ian tian varman fonton. Multfoje mi dankas, sinjor' doĥtoro.' kaj li lamis el la konsultejo - nur flaketo sur la planko

restis post li.

Kaj vidu, sinjoro kolego, la ~~nikso~~ el Havlovice estis ~~pruderza~~ kaj obeis; li loksidiĝis ~~en~~ ~~ĉi~~ varma fonto kaj eligas el profundoj de la tero tiom da varmega akvo, ke sur tiu loko nun estas eterna varma fonteto. Kaj en tiu varmega fonto baniĝas homoj kaj ankaŭ al ili ĝi bone efikas je la reŭmatismo; tien oni veturas el la tuta mondo por kuraci sin. Sekvu la ekzemplon, sinjoro Magiaŝo, kaj obeu ĉion, kion ni, doktoroj, konsilos al vi."

(el *Naŭ fabeloj* de Karel Čapek)

MI LEGIS „LA HETAJRO DANCAS“

Longe ni atendis, precipe la aŭtorino, Eli Urbanová, la eldonon de la avizita romano „Hetajro dancas“. Fine, en 1995 la brazila FONTO de G. Bays liveris ĝin pretan, lastmomente, al la aŭtorino. (Mi ne skribas recenzon - pri tiuj mi vere scivolas - sed nur atentigan noticon).

La verko de nia enmondo jam konata poetino Eli Urbanová prezentas, laŭ mia scio, ĝis nun la plej grandan (ampleksan) originalan beletraĵon en esperanto post Vallienne. Ĝi ja havas 327 paĝojn!

Ĝi estas romano aŭtobiografia de esperantistino pri ŝiaj amoj, pasioj, ekstaza ĝuo kaj feliĉo kun intermezoj de prema doloro. Nur amo inter ŝi kaj Julio Baghy restis platona. Sed la verko kunprezantas galerion de konataj esperantistoj, ĉeĥaj kaj alilandaj (eĉ min ŝi ne ellasis, plurfoje). Mian ekridon elvokis la ĉarma (?) mencio pri John Wells kaj lia matena kutimo. Valoraj estas la multaj leteroj, preskaŭ instrukciaj de Julio Baghy, al ŝi,

rilataj precipe al ŝia poemkrea arto.¹⁾ Klariĝas al mi nun la malnovaj asertoj de samideanoj, kiuj ĝis nun estis por mi apenaŭ kredeblaj pri la efektiva rilato de Eli kaj de (adorata) Jano (Zemek, ŝajne honora bramano, kiun mi konas el Rum-burk jam de 1936). Kaj mi devas nun peti pardonon pro mia tiama opinio pri Eli esti forlasinta „senkaŭze“ la edzon Ŝtefo (p. 216)²⁾ - Cetere, Urbanová notas (p. 180): „Kaj estas egale al mi, kion pensas doktoro Pitlík kaj Slanina kaj kion pensas Mařík.“³⁾

Mi kredas, ke la fabulo de la libro estas inspirita de la „Litomišla tombejo“ de Karolo Piĉ. Pri tiu William Auld en tiutempa recenzo konstatis, ke la „Tombejo“-n evitu homoj prudaj. Mi konstatas, ke tiom pli tio validas pri la „Hetajro“!

El teksto sur la librojaketio la leganto sciiĝas, ke „H.D.“ estas vera okazaĵo en nia beletro. Verkis ĝin elstara poetino ĉeĥa tre malkaŝe kaj kuraĝe (kiel ŝi diras: „senkliŝe, senprude, kaj sentabue“). Lingve kaj stile, kiel prave oni atendu de unu el niaj pintaj poetinoj kaj akademianoj, nia HETAJRO estas senriproĉa --- konstatas FONTO.

Jes, la leganto baldaŭ konstatas, ke la uzita lingvaĵo impresas elegante. Kiel prezo por tio preskaŭ komplete malaperas la prefikso „mal“, anstataŭigita per novismoj, ekz. PIV-aj sor, sob (supren, malsupren), poke (malmulte); originaleca ŝajnas „oldinaĉo“ por nia „baba“. (Mi vetus, ke tion eltrovis Rumlér, analoge al lia „kiaĉu“ en „Ŝvejk“). Taŭgas „kastelvilaĝo“ por „opidumo“.

Interesa termino, eble komprenebla intemacie: *prcek* (*rumu*) rumonano. La ĉefinaj glosoj enlistigas 18 ne-PIV-ajn neologismojn. Sen kompreno por mi restas „vostao“ kaj „estao“ sur p. 155. Preseraroj preskaŭ forestas (pipo-vipo k.a.). Sed miasperte la nomo de la al ŝi aŭdaca ruso ne estas Rudkov, sed Rytjkov (p. 151). --- Ni sciigas pri alta aprezo de la „Lasta ĉevalo“ (jam pli frue ni ĝin konas) de J. Rumler: „Kvazaŭ Halley-kometo aperanta unufoje dum jarcento“ (plume de Knoedt); „potenca, obseda verko“ (Rossetti). Auld: „Gravega poemo en nia originala literaturo“.

La „Hetajro dancas“ certe ekfuroros ĉe la literatur-amantoj. Lektoris Reto Rossetti kaj Josef Rumler. Prezo-indiko mankas. ⁴⁾

Jaroslav Mařík 25.11.1995

Glosoj:

1) La prozo-ĉapitrojn buntigas enmeto de propraj poemoj rilataj al la tekstoj.

2) Hazardo volas, ke mi ĝuste nun ekscias, ke en la postlasaĵo de la konata Raymond Schwartz en Parizo estis trovitaj kvin verkoj de Ŝtefo Urban, pri kiuj interesiĝas germana eldononto.

3) Priplorata restas la ne plu viva Ernesto, konatiginto el la ege ŝatata arbarvalo Ŝarka en Prago, filo de grek-katolika pastro en Subkarpata Rusio, dizertinto el la hungara armeo, veninta en Pragon kiel armeano de generalo Svoboda. La movoplena historio de Ernesto estas aperinta jam pli frue, en 5-6 felietonoj, en Večerník Praha. Evento-riĉa.

4) Laŭ *Esperanto 12/1995* ĝi kostas 51.60 gld (ĉirkaŭ 800 Kč) - rim. de red.

Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature 8

Josef Kavka

-KS-, -C-, -K-

Per jena, jam oka (STARTO, 1994, 4, 20-21; 5/6, 23-26; 1995, 1, 12-14; 2/3, 17-19; 4, 8-11; 5, 5-7; 6, 10-14; 1996) konsidero, ni aŭdacas tumi atenton de nia pacienca leganto al la Eo-vortoj, kiuj originas el la tria latina deklinacio, speciale el jenaj tipoj:

<i>pax</i>	genitive	<i>pacis</i>
<i>index</i>	"	<i>indicis</i>
<i>calix</i>	"	<i>calicis</i>
<i>vox</i>	"	<i>vocis</i>
<i>nux</i>	"	<i>nucis</i>

Ni vidas, ke la genitiva radiko ĉiam havas la konsonanton C anstataŭ X en la radiko nominativa. Tamen, okaze de EX, la genitiva ŝanĝo tuŝas eĉ la vokalon: IC. Ĝuste tiu ĉi tipo interesos nin, enkadre de natursciencaj nomenklaturetoj, unuavice:

Por Esperanto sin proponas kvar ebloj:

1. -EKS- apogata sur la radiko nominativa
2. -IC- sekvanta la pli produktivan radikon genitivan
3. -IK- same laŭ genitivo, sed fonetike adaptita
4. Ekzistas ankaŭ precedentoj por apliki nudajn radikojn, t.e. post forigo de la finaĵoj kaj nominativa, kaj genitiva: *Atriplex* = atriplo, *atriplicifolius* =

atriplifolia

Culex = kulo, *Culicidae* = kuledoj

Cimex = cimo, *Cimicidae* = cimedoĵ.

Tiu ĉi kvara procedo taŭgas por laika uzo, pro la rezulta koncizeco. Tamen, en la leksiko de Esperanto ĝi aperas tre sporade. En la praktiko nomenklatura, ĝi ne estas rekomendinda, evidente. Por la laste nomita *Cimex* la zoologoj sendube bonvenigus pli eble *cimico* el la familio de la *cimicedoj*. *Cimicifuga* = *cimico-fugo*, planto kontraŭcimica. El PIV neniuj divenas koheron inter *cimo* kaj *cimicifugo* ... Ni opinias, ke la nomenklatura logiko estas nepre konservenda.

-EKS-aĵon **fundamentan** ni ne trovis, el **oficialaĵoj** koncernas nian temon du precedentoj, nome ilekso (akvifoliaĵoj), pli bone **ilico** kaj indekso, kiu proprasence ne apartenas al nomenklaturaĵoj.

Bedaŭre, en la leksiko **neoficiala** generiĝis dekunuoj da terminoj:

1. apekso (*apex*, *apicis*). La botanikaj speci-epitetoj *apicalis* kaj *apiculatus* klare pledas por la formo genitiva. Cetero ekzistas ankaŭ la Eo-vorto **apika**, kies signifo estas ekvivalenta al tiu de „apekso“, do pli bone **apiko**;

2. demodekso (*Demodex*), la parazitakaro meritis esperantiĝi kiel **demodiko** kaj la de li kaŭzata mamul-malsano **demodikozo** (ne „demodeksozo“ laŭ PIV);

3. haruspekso (*haruspex*), etruska, poste oldromana pastro, kiu divenadis estontecon el best-internaĵoj. La germana pluralo estas formita laŭ la latina: *Haruspices*, la koncerna „arto“ estas latine *haruspicina*, germane *Haruspizin*, ĉeĥe *haruspictví*. Komento plua - superflua:

4. ibekso (*ibex*), alpa kapro. La pli ĝusta formo **ibiko** koincidus - sendanĝere - kun **Ibiko**, la helena poeto *Ibikos*;

5. karekso (*Carex*). Jen du botanikaj speci-epitetoj: *caricifolius*, *caricinus*, kaj unu fitocenologia ordo *Caricetale*. Laŭ nia imago, en Esperanto devus esti **karico**, **karicofolia**, **karic(ec)a**, **karicetalo**, do ĉiuj sen -EKS-;

6. kodekso (*codex*). Al tiu ĉi neoficiala PIVaĵo ni rimarkigu, ke la zamenhofa **kodicilo** (*codicillus*) demonstras la produktivecon de la formo genitiva. Temas ja pri diminutivo el *codex*;

7. kortekso (*cortex*). Tiu ĉi malbonŝanca formo ne koheras kun la parencaj terminoj **kortiko**, **kortikoterapio**, **kortikotropo**, **kortizono**. Certe sufiĉus **kortiko** ankaŭ por la supraĵa tavolo de cerebro kaj cerebela. Ja ekz. neŭrofiziologo scias distingi inter procesoj **kortika** kaj **subkortika**;

8. murekso (*Murex*), la gastropodo devus esperantistiĝi kiel **murico** (kp. la italan: *múrice*);

9. polekso (*polex*), kp. ree la italan *pollice*. Tamen, kiu riskus krimi, „generunte“ homoniman anatomiaĵon al la fundamenta **polico** (it: *polizia*)?;

10. rumekezo (*Rumex*) el poligonacoj devus esti **rumico**, do *rumicifolius* fariĝus *rumicofolia*;

11. ulekso (*Ulex*) el fabacoj (laŭ PIV: legumenacoj) devus esti **ulico**; kp. la specian epiteton *ulicinus* = *ulic(ec)a*;

Kaj nun ni esploru ĉi-koncernajn -IC-vortojn. Certe ne apartenas tien ĉi **indico**, ĉar ĝi estas prenita el la latina

indicium (fr: *indice*), ne el *index*. Jen kial ni rezignu riproĉi al la supra **indekso**, kvankam la angla ekvivalento de indico = *index*. Ekz. la petrologia termino *colour index* = **kolor-indico**.

Inter la **-IC**-vortoj **fundamentaj** kaj **oficialaj** ni ne trovis precedenton, kiu devenus el latina **-EX**-vorto.

Inter la **neoficialaj** ekzistas:

1. komplico (*la: complex, fr: complice, de: Komplize*). Ĝi jes dokumentas la koherecon kun la genitiva formo **-icis**;
2. silico (*la: silex, silicis* = kvarco aŭ dura ŝtono ĝenerale). Kp. la ĥemia elementon silicio kaj la fundamentan **siliko**, al kiu ni revenos pli poste;
3. vertico (*vertex, verticis*), laŭ PIV zamenhofa, estas formita „laŭ nia gusto“, same kiel
4. vortico (*la: vertex, pli antikve: vortex*). Ĉi-okaze ni iom dubas. Ĉu oni nepre bezonas novan radikon, paroniman al la zamenhofa. Ĉu vertico ne povus priservi ĉiujn koncernajn nociojn, nome, krom la tri geometriaj ankaŭ la fizikan kaj anatomian?

Kiel pli supre dirite, tria eblo, nome fonetike adapti la genitivan formon **-ICIS** el la nominativo **-EX-**, estas **-IK-**.

La **fundamentaj** koncernaĵoj estas **pumiko** (*pumex*) kaj **siliko** (*silex*). PIV registras ankaŭ la verbon **pumiki** (*pumicare*), t.e. poluri per pumiko. Eble ĝuste tiu verbo inspiris la kreinton de Esperanto elekti **-IK-** anstataŭ **-IC-** („pumico“). Aliflanke al „pumico“ kondukus la latina adjektivo *pumiceus*.

Laŭ la precedentaj pumiko kaj siliko estas elektita ankaŭ la **neoficiala** vorto

kortiko, kiun ni tuŝis jam konekse kun la malbonŝanca „kortekso“.

Kiom temas pri la fundamenta **siliko**, la mineralogoj bonvenigas ĝin, por nomi kriptokristalan kvarcon aŭ ĥalcedonon kaj tiel distingi de **silico**, t.e. silicia oksido kiel termino (petro)ĥemia. Tamen atentidnas, ke ioma nelogikeco restas inter silico kaj silikato. Laŭ nia scio jam *Piŝoro* (1980) venis kun la propono pri silicato, kiun formon registras ankaŭ *Portmann-Rogers* (1993) apud la ĝenerale uzata silikato. Kvankam temas pri bona intenco, establi planlingvan ordon, estas tre dubinde, ke el la ĥemia Esperanto-terminaro baldaŭ malaperus silikato, silikono, silikozo k.a. En ĥemio, ĥemia teknologio, mineralogio, petrologio kaj biologio svarmas multaj internacie kodigitaj terminoj barakte inter **-IC-** kaj **-IK-**: silica ĝelo, siliceoj (spongoj), *siliceus* = botanika speci-epiteto; ilicido, silicigi, silicikolaj organismoj, silicito, silikatigo, silikofito, silikoflagelatoj, silikoapatito, silikoborokalciito, silikoilmenito, silikomagneziofluorito, silikomonaĵo, silikotelito k.a.

Jen ĉio, kion ni deziris diri pri la vortoj, kies latinaj originaloj finiĝas per **-EX-**, do eblas transiri al tiuj, kiuj finiĝas per **-IX-**. Analoge, unue ni dediĉu atenton al la - laŭ ni evitindaj - **-IKS-** aĵoj.

Atendeble, vane ni serĉus tiajn inter la **fundamentaĵoj** kaj **oficialaĵoj**. Ne apartenas tien ĉi la helena *onyx*, **-chos**, do **onikso** restas ekster niaj riproĉoj. Tamen zamenhofa, laŭ PIV, estas **bombikso** (*Bombyx*); tiu ĉi formo ne koheras kun la latina famili-nomo *Bombycidae*,

kun la birdogenro *Bombycilla* kaj kun la botanika speci-epiteto *bombycinus* = silklanca. Sendube por la biologiaj nomenklaturetoj pli bonorda situacio ekestus pro **bombico**, **bombicedoj**, **bombicilo** (jes en PIV) kaj fine **bombica** (por la botanikaj specioj).

Aliflanke, rebapti la - kvankam ne-oficialan - Felikson al „Felico“ estus ioma kuriozaĵo. Male, helikso (*helix*) estas apenaŭ konvena. La koncerna orelparto, se nomata **helico**, cete ne konfuziĝus kun la terminoj geometriaj aŭ teknikaj. Al la helic-ajoj ni ankoraŭ revenos.

Post la -IKS-ajoj ni alpaŝu la -IC-ajojn ĉi-koncernajn. Estas surprize, kiom malmultaj Esperanto-radikoj utiligas tiel ĉi la genitivan formon de la latinaj originaloj. Unusola -IC-**fundamentaĵo** adventico ne tuŝas nian konsideron, ĉar ĝi ne devenas de -IX-: *Tunica adventitia*.

Same unusola **oficialaĵo** helico, jes interesas nin tre, ĉar ĝi ŝajnas konveni ĉial. Laŭ PIV ĝi esprimas unu nocion geometrian kaj du nociojn teknikajn. Al la tri signifoj eblus aldoni la pli supre menciitan, nome tiun de l' orel-anatomia „helikso“. La zoologoj probable ne hezitus uzi **helicon** ankaŭ por la gastropoda molusko, tiom pli eble, ĉar la koncerna familio estas nomata latine *Helicidae*, do helicedoj. La kohero etimologia inkludus ankaŭ la genron *Helicella* el la familio *Hygromiidae*. Fine la geometriaĵo **helicoido** (PIV) kompletigus la planlingvan impreson.

El la **neoficialaj** vortoj ni povus tuŝi apendicon (*appendix*), direktricon (*direc-*

trix) kaj matricon (*matrix*). La lasta estas zamenhofa, laŭ PIV. Ĉiuj tri terminoj estas bonorde esperantigitaj. Meretrico (*meretrix*) apenaŭ interesos natursciencan nomenklaturiston ...

En PIV ne estas registrita la fama palmo *Phoenix dactylifera*, kiun EB (1988) nomas „daktil-palmo“. Nu, tia nomo taŭgas por beletro, sed ne por botaniko. Ĉar Fenicio portas sian nomon ĝuste laŭ tiu ĉi palmo, plej nature ni esperantigu ĝin: **fenico**, kvankam homonime kun ano de la semida popolo.

Kaj nun, kiuj latinaj originaloj fariĝis en Esperanto -IK-ajoj?

Da **fundamentaĵaj** ekzistas sepo:

1. filiko (*filix*) apud la speci-epitetoj *filicifolius*, *filiciformis*, kaj *filicinus* pli eble devus fariĝi „filico“, se ne temus pri fundamenta kaj bone establita nomo. Cetere, la scienca genronomo estas driopterido (*Dryopteris filix mas*), dum la subklasnomo *Filices*, menciita en PIV, jam malaperis el la sistematiko. Nuntempe, la botanikistoj uzas jenan sistemon: *Divisio Polypodiophyta*, *Ordo Polypodiales*, *Familio Aspidiaceae*, *Genus Dryopteris*. Do, la fundamentaĵo ĝeneralsenca, la filikoj, povas servi sole por uzo laika, ekz. en beletro.
2. histriko (*Hystrix*), rongulo el la familio de histrikedoj (*Hystriidae*), ĉu do „histricedoj“ kaj „histrico“ por la scienca uzo?
3. kaliko (*calix*) bone koheras kun kalikanto (*Calycanthus*), laŭ la helenaj *kaly* kaj *anthos*.
4. mastiko (*mastix*), laŭ la helena *mastihe*; mastiki (*fr: mastiquer*).

5. perdriko (*la: Perdix, sp: perdix*) por scienca uzo devus fariĝi eble „perdiko“ aŭ „perdico“.

6. radiko (*radix*) liveras plejadon da speci-epitetoj: *radicalis, radicans, radicantissimus, radicans, radiceformis, radiceformis, radicosus, radiculatus*.

7. saliko (*Salix*) el la ordo de salikaloj (*Salicales*), la familio de salikacoj (*Salicaceae*) donas la speci-epitetojn *salicifolius* = salikofolia kaj *salicinus* - salik(ec)a.

Zamenhofa (laŭ PIV) estas ankaŭ cerambiko (*Cerambyx*), skarabogenro el cerambikedoj (*Cerambycidae*).

Inter la vortoj oficialaj interesas nin jenaj tri:

1. heliko (*Helix*) el la familio de la helikedoj (*Helicidae*); ĉu do prefere helico kaj helicedoj, por la uzo pure scienca? La problemon ni tuŝis jam okaze de helico.

2. korniko (*cornix*) el korvedoj; la latina lingvo havas ankaŭ diminutivon *cornicula*, t.e. korniketo. Etimologia konekso de korniko kun korno (*cornu*) estas evidenta.

3. lariko (*Larix*) el la subfamilio de larikoideoj (*Laricoideae*) liveras la speci-epitetojn de aliaj plantoj: larik(ec)a (*laricinus*) kaj larikofolia (*laricifolius*).

Fine restas koncernaj kvar neoficialaĵoj:

1. cerviko (*cervix*). Por la -IK-formo pledas ankaŭ la latina adjektivo *cervicalis* (prononcu -kal-) = cervika, ekz. *glandulae cervicales*.

2. skandiko (*Scandix*) el apiacoj (laŭ PIV: umbeliferacoj); kp. la latinan verbon *scandere* = grimpi: la planto

emas apogi sin sur najbaraj arbustoj.

3. spadiko (*spadix*). Tiu ĉi infloresko donis la speci-epitetojn *spadiceus* = spadi(ec)a kaj *spadiciflorus* = spadiko-flora.

